Agnieszka estas laboranta por la pola kulturo kaj je la fino de sia jara laboro decidis organizi ĉi tiun Seminarion kun invitoj al esperantistoj de la tri landoj, precipe al BEJO, [Brazila Esperantista Junulara Organizo]. El kelktridekaj partoprenintoj, argentinaj ĉeestantoj estis 15, [el *Wanda, Buenos Aires, Neuquén kaj Pres. R. Sáenz Peña*]. El Brazilo estis 14, el 8 urboj, kaj el Urugvajo 1 [el *Montevideo*].

La partopreno estis tute senpaga, kaj ebligis interkonatiĝon kaj viziti plurajn interesajn lokojn, i.a. muzeon pri pola enmigrado, minejon de juvelŝtonoj, kaj la mondkonatajn "Akvoŝtaloj Iguazú".

Verdire, oni parolis, dancis, manĝis, kantis kaj promenis en Esperanta etoso, kiel “familio”, kaj la evento donis tre interesan lecionon, kiun ni devos atenti por daŭrigi pli efikan aktivadon favore al E-movado en nia lando.

Oni proponis, ke venontjare denove okazu E-Seminarion ĉi tie.

Pliajn informojn en venonta numero.

www.esperanto.org.ar



Partoprenintoj de la Seminario ĉe Akvoŝtaloj

Landa Kongreso

ELNA kongresis en Novjorko ...

*de la 21-an ĝis la
24-an de julio 2006*

En Novjorko, la granda urbo kie loĝas la Unuiĝintajn Naciojn, la **Esperanto-Ligo por Norda Ameriko** [ELNA], kongresis kun granda kunlaboro, granda ĝojo, granda amikeco, kaj granda espero. Okdek ok partoprenis la **54-an Landan Kongreson de ELNA**.

La estraro kaj la ĝenerala membraro tie aprobis unuanime la buĝeton kaj laborplanon de ELNA. Tiu laborplano estis la unua laborplano por ELNA dum la pasintaj kelkaj jaroj, kaj donas klaran vizion por farendaj taskoj. En tiu laborplano ni esprimas, ke ni havas grandajn celojn por akiri novajn membrojn, ĉefe per pli aktivaj lokaj grupoj.

Rilate al tiu kreskado la laborplano ligas la kvanton da membroj kun la kvanto da paĝoj en nia bulteno "Esperanto-USA". Ekzemple, kiam ni atingos 800 membrojn, nia bulteno havos dek ses paĝojn anstataŭ la nuna dek du.

Unu el la pli gravaj ŝanĝoj estas, ke ni aprobis monon por reklamado sub la rego de la Komitato por Informado. La ĉi jara buĝeto montras du mil dolaran negativan saldon, kiu signifas, ke ni devas puŝi forte por akiri novajn membrojn. Ĝenerale ni estas en sufiĉe bona stato, kaj havas nenian kialon por ne kreski.

Ni nomis komitaton por trovi novan direktoron de la Centra Oficejo [de ELNA]. Don Harlow, la direktoro de la

CO anoncis ke li ne plu povos labori pro malsano.

Laŭplane, ni havos la novan dungiton en la oficejo komence de novembro.

Tiu kaj Don laboros kune dum kvar monatoj por fari la ŝanĝon glate.

Elektitaj al la estraro estis Lusi Harmon (ree), Joel Amis (ree), kaj Trevor Andrews (nova estrarano!). Ankaŭ Vilĉjo Harris estas la kasisto denove.

Ni havas bonan estraron por ELNA, sed memoru, ke la ĉefa laboro restas ĉe la lokaj grupoj. Tie la membroj agas aktive kaj daŭre.

Ni unuanime aprobis la proponon kongresi en Tihuanu, Meksikio, la 27an ĝis la 30an de julio, 2007. Tio estos la 55a landa kongreso de ELNA.

Planu nun ĉeesti! Certe tio estos ege bona kongreso, kaj eble la plej granda.

Ni aprobis, ankaŭ unuanime, proponon rekomendi kiel eble plej forte partoprenadon en la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kiu okazos en Kalgario, Kanado, la 20-an ĝis la 26-an de majo, 2007. Notu tiun daton sur via kalendaro kaj faru planojn por ĉeesti. Ni ĝuis ne nur la kunsidojn (plenkunsido de ELNA, aferkunsido de AAIE, fakaj, ktp), sed ankaŭ la bankedon kun bongusta manĝaĵo. Ĉe la bankedo ni aŭkciis donacitajn aferojn por akiri monon por ELNA. Multajn dankojn al la loka kongresa komitato (LKK), kaj aparte al Tomaso Eccardt kaj Jim Henry, kiuj faris bonegan laboron por plani, organizi, kaj realigi la kongreson.

Vidu fotojn ĉe:

<http://esperantofre.com/elna06/>.

La Retslamo, internacia poezia konkurso, okazis dum la distra vespero. Por originala poezio, la 1-an rangon gajnis Leonido Ŝindeleviĉ, rusdevena kanada poeto. Por ne-originala

deklamado venkis Ĝerardo Tobias (el Pollando, Usono). Okazis ankaŭ aliaj ludoj. Ĵenja kaj Joel Amis gastigis amuzegan vort-ludon pri PIV (kontraŭ ne-PIV) difinoj.

La kongreso okazis ĉe FIT, la *Fashion Institute of Technology*.

Kelkaj partoprenantoj tranoktis en la dormejo ĉe la Nova Lernejo. Multaj ĉe-estantoj ekskursis en la urbo, ekz. al la supro de la Imperi-ŝtata konstruaĵo [ĉiel-skrap], al la Statuo de Libereco, al la Unuiĝintaj Nacioj, kaj al Kafejo Esperanto. La kulturo en Novjorko, miksaĵo de multaj naciaj kulturoj, estas ĉie, en muzeoj, en la metrooj, en la busoj, surstrate, kaj certe en la multaj interesaj restoracioj.

Unu el la plej gravaj eventoj estis, ke ni unuanime donis honoran membrecon al Don Harlow, kiu sindone laboris multe, ne nur en la Centra Oficejo de ELNA, ne nur kiel iama prezidanto de ELNA, ne nur por tiu fama retpaĝaro pri literaturo, sed multflanke por la movado en Usono kaj tutmonde. Ni dankas, dankegas al Don pro la bona laboro.

Ĉi tia raporto ne vere ĝustas, ĉar mankas la vortojn por priskribi la riĉan etoson kaj feliĉan amikecon, kiujn la samideanoj spertis dum la landa kongreso de ELNA, en Novjorko, la Granda Dom-bloko.- *Raportis: Phil Dorcas, ELNA-prezidanto*

Brazila

E-Kongreso 2007

La jaro 2007 estas memorinda pro speciala jubileo: 120 jaroj de la kreado de Esperanto kiel lingvo neŭtrala internacia kaj 100 jaroj de la kreado de Brazila Esperanto-Ligo [BEL] en la urbo Rio de Janeiro. Ankaŭ festos 40 jaroj la Brazila Esperantista Junulara Organizo [BEJO].

Ni omaĝe rememoros la pionirojn kaj veteranojn de la E-movado en Brazilo.

La **42-a Brazila Kongreso de Esperanto**, de la 8-a ĝis la 13-a de julio 2007, en Rio de Janeiro, estos kulmino de tiu jubilea jaro. Diversaj memorigaj programoj okazos kiel oni povas konstati en la hejmpaĝo: www.aerj.org.br

La kongresa temo: “Cent Jaroj de Esperanto-movado en Brazilo” ebligos la plej diversaj prelegoj, ekspozicioj, lanĉoj de diversaj E-materialoj: libroj, KD, DVD, poŝtmarkoj, glumarkoj, t-ĉemizoj, kaj tre allogaj turismaj ekskursoj.

La kongresejo estos UERJ [*Universidade do Estado de Rio de Janeiro*]. Ĝi estas unu el la plej grandaj universitato en Brazilo, kie funkcias 29 fakultatojn kaj institutojn. Ĝi prezentas moderne ekipitajn salonojn, kongresejojn kaj lernoĉambrojn. Ĝi disponigas krom la ĉefan teatron kun 1200 sidlokoj, akustikan konkon kun kapacito por ĉirkaŭ 3000 spektantoj kaj modernan ekumenan preĝejon. Loka Kongresa Komitato laboras por ke la partoprenantoj havu ne multekostajn hotelojn kaj laŭ eblo komunan loĝejon

La kongresa urbo Rio de Janeiro, ĉefurbo de Brazilo ĝis 1960, konata kiel “*Cidade Maravilhosa*” [urbo mirinda] en 2005 nombris 6.094.183 da loĝantoj. Ĝi proponas pli ol 300 vidindajn kaj pitoreskajn lokojn. La klimato estas milda dum la tuta jaro kun meza temperaturo de 22°C.

Kongresa organizado:

Asocio Esperantista Rio-de-Janeiro

[AERJ]: www.aerj.org.br

Kontakt-adreso: **bke42@hotmail.com**

Aŭspicias:

Brazila Esperanto-Ligo

<bel@esperanto.org.br>

El la Unua Kongresa Bulteno

Sukcesa UK

Universala Kongreso de Esperanto en Italio

Kongresa temo: "Lingvoj, kulturoj kaj edukado por daŭropova evoluigo".

Ankaŭ ĉi jare, kun la kutima kaj ĉiama sukceso okazis la **91-a Universala Kongreso de Esperanto**, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. Ĝi disvolviĝis en la antieja kaj kultura itala urbo Florenco.

Ĉi tiu estis la salutmesaĝo de AEL, rete sendita por la Kongreso:

"El Bonaero-urbo en Argentino, ni sendas elkorajn salutojn, nome de la argentina esperantistaro kaj de AEL [Argentina Esperanto-Ligo]. Dank'al interreto, ni esperas daŭrige informiĝi, kaj do mense kaj kore partopreni je la distanco la agadojn de la kongresanoj. En tiaj ĉi malĝojaj tempoj de milito kaj malamo ni scias ke "nia diligenta kolegaro en laboro paca ne devas laciĝi..." sed plu labori por la "sankta, granda kaj grava ideo de Esperanto: frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj" (Z)! Kun niaj deziroj de plenplena sukceso.

*Alcides P. Wentinck, prezidanto,
Jorge Cabrera, sekretario.*

Kun lastmomentaj aliĝoj la oficiala nombro da partoprenantoj atingis 2209 el 62 landoj. Francio retenis ĝis la fino la unuan lokon, laŭ statistiko aliĝis 302 el Francio, 279 el Italio, 181 el Japanio, 159 el Germanio, 73 el Brazilo, 22 el Kanado, ktp.

Ni ricevis la konfirmon, ke dum la kutima programero s-ano Jorge Tarducci, argentinano nun loĝanta en Italio, laŭ alfabeto landordo, inter la unuaj salutis nome de AEL kaj la argentina E-movado. La UK-on partoprenis aliaj tri argentinanoj nun loĝantaj en Eŭropo.

Kun la Kongresa Numero 2209, aliĝis la plej juna kongresano, Aquilina, du monata

bebo, kiu partoprenis lastajn sesiojn dormanta inter la brakoj de sia patro, itala esperantisto Gabriele, kiu aperis en foto de la lasta Kuriero.

Ĝeneralaĵoj pri la kongresa programo

La Universala Kongreso strikte plenumis sian programon.

En la retpaĝo de la 91-a UK:

<http://www.uk2006.info/>, ĉi foje, kaj en PDF formato, legeblas la plurajn numerojn de la Kongresa Kuriero "Florenca Lilio". Vi povas rekte informiĝi detale pri okazigo de la Kongreso. Sed, laŭdiro de la ĉef-redaktoro de la Kuriero, eĉ sidante antaŭ la komputilo dum la tuta tago, ne eblis raporti pri la lavango de eventoj kiuj okazis en la UK. Do la Kuriero apenaŭ donas resuman panoramon pri la agado. Kaj plenajn informojn ni trovas nun en E-revuoj, precipe "Esperanto" de UEA. Krome, la itala revuo "L'Esperanto" promesis dediĉi sian venontan numeron tute al la Florenca 91-a UK. Same faris "La Espero", "Heroldo de Esperanto" kaj "La Ondo de Esperanto", ktp.

Dimanĉe, la 30-an de julio okazis la solena inaŭguro, kun amasa partopreno en la kongresejo. La unua prelego pri la temo de la kongreso estis fare de la svisa prof. F. Grin, jam tre konata inter esperantistoj pro siaj proponoj de la solvo de la monda multilinceco pere de Esperanto, anstataŭ la angla kiu favoras nur kelkajn naciojn.

Alie korekte estis plenumita la programo de la unua tago, kun la kutimaj apartaj kunvenetoj kaj la malfermo de la libroservo, kun preferataj prezoj pro la okazo.

La tago estis tre varma en Florenco, kun 35° C. Sed jam ekde la inaŭguro oni parolis pri vere sukcesa UK.

Jen nur kelkaj ĉefaj rimarkoj

- "Kleriga lundo tra Esperantujo": kun dekvin seminarioj pri diversaj temoj.

- Italaj Ĵurnaloj kaj RAI [Itala Radio-Televizio] donis ĉiutagan informon pri la Kongreso.

-Ankaŭ la "Infana Kongreseto" kunvenis, en sia 50-a jaro: ĉar estis kreita en 1956 dum la 41-a UK en Kopenhagen.

-La oficiala poŝtoŝeĉejo de Florenco, liveris specialan stampon memore de la 91-a UK.

-La oran "Medalon de Toleremo" de la Zamenhofa Fondumo ĉi jare estis donita al la "Tutmonda Skolta Movado" enmane de la SEL-prezidanto.

-UEA deklaris du novajn "Honorajn Membrojn": Otto Haszpra y Umberto Broccatelli, elstaraj esperantistoj el Hungario kaj Italio.

-Kunvenis la "Elekta Komisiono", kiun elektos venontjare en la 92-a UK, en Jokohamo, novan UEA prezidenton.

-Lunde nokte, okazis la "Kongresa Balo" en la "Palazzo degli Affari" proksime de la kongresejo kun amasa partopreno de dancamantoj.

-Marde la programo enhavis "Tagon de la Lernejo": do informoj kaj proponoj pri la instruado de Esperanto en Lernejoj kaj Universitatoj en la tuta mondo.

-La Estraro de UEA, en speciala kunveno publike respondis al ĉiuj demandoj de la ĉeestantoj: pri Esperanto en Afriko; interrilatoj kun "Civito"; ebla transkokiĝo de la UEA-CO; financoj; libroservo; altiĝon aŭ ne de la jarkotizojn; aliĝon de novaj landaj asocioj; ktp. La komitatoj diskutis pri ĉiuj aliaj problemoj, kiujn ne mankas en la Esperanto-movado.

-Estis disdonitaj atestiloj pri la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA.

-Multaj fervojistoj kunvenis kun informoj post la granda kongreso okazinta en Ĉinio, kie estas nun la plimulto de esperanto-parolantoj en la fervojoj.

-Oni atendis ankaŭ prelegojn de nia konata mondvojaĝanto Daniele Binghi.

-Kaj la kutimajn proprajn kunvenojn de la ĉefaj fakaj asocioj, kiel AIS, IKUE, Oomoto, EVA.

-La premion "Deguchi" ricevis Simo Milojeviĉ, multjara oficisto de UEA kaj aktivulo de la E-movado. "Deguĉi" estas

monpremio kiu celas distingi la plej meritajn aktivulojn sur la kampo de la utiligo de Esperanto konforme al la idearo de L. L. Zamenhof kaj instruoj de Deguĉi Onisaburo.

-Tri aliĝpetojn de landaj asocioj ricevis UEA: Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj, Nepala E-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Taĝikio. Du estis akceptitaj. Tamen de Taĝikio ankoraŭ ne, ĉar nepra kondiĉo por nova landa asocio devas esti respekti la statuton de UEA kaj tiu promeso ankoraŭ estis ne plenumita. Nun UEA havas 67 aliĝintajn landajn asociojn.

-Debato okazis pri avantaĝoj de ebla traslokiĝo de la UEA-CO, el Roterdamo al Bruselo. Oni konsideris, ke kvankam hodiaŭ Bruselo estas grava urbo, ĉar estas centro de Eŭropa Unio, tamen neniu povas scii, ke post 30 jaroj alia urbo estos pli grava.

- La venonta 92-a UK, okazos en Jokohamo, Japanio. Ankaŭ oni informis, ke en la jaro 2008, [centjara datreveno de UEA], la 93-a UK okazos en Roterdamo, kie situas la Centra Oficejo de UEA. Kaj en la jaro 2009, [150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof], eblas ke la 94-a UK okazos en Pollando.

Pola Radio, Ĉina Radio Internacia, Radio Havano-Kubo, Itala Radio, Radio Vatikana, Ĝangalo.com kaj multaj aliaj amas-komunikiloj ĉiutage informis pri la Kongreso.

Plie partoprenis okdeko da volontoj de la Itala Esperanto-Movado, ĉefe junuloj, kiu kunlaboris en la bona marŝo de la tuta Kongreso kaj la eldono de la "Kongresa Kuriero", sub respondeco de teamo de IKUE.

Remarkinde estas pluraj ekskursoj; vizito de la partoprenantoj de la "Infana Kongreseto"; kunveno de la Akademianoj AIS-IKU; publika kunsido kaj prelegoj; fakaj asocioj kaj publika kunveno kun la Estraro de UEA, ktp.

Vendrede la 4-an de aŭgusto, la 91-a Universala Kongreso eniris je la finon. Kaj ĉiuj kongresanoj rapidiĝis partopreni lastajn

programerojn, resaluti geamikojn, aĉeti lastajn librojn, preni lastajn fotojn kun la kunularo. Dume la UEA Komitato diskutis kaj redaktis la Kongresan Rezolucion legeblan en la lasta numero de kongresa Kuriero:

<http://www.ikue.org/uk/uk06.pdf>

La Kongresa Rezolucio enfazas la edukon kaj klerigan celon de la Esperanto-movado, en laboro por la paco kaj plibona mondo, kun lingva demokratio.

La kongresanoj tamen ankaŭ kun emfazo petegis solidaron antaŭ la grava okazintaĵo de la nunaj militoj, pri kio oni parolis dum la tuta kongreso.

La urbestro de Yokohama, Japanio, Nakata Hirosi invitis ĉiujn kongresanojn, partopreni venontan 92-a UK en sia urbo en la jaro 2007: “japana registaro publike apogos la Esperanto-UKon.”

Post tiaj ĉi intensaj labortagoj, kongresanoj adiaŭis unu la aliajn portantaj en la profundo de siaj koroj la urĝa alvoko al la paco, kiun esperantistoj celas konstrui inter la popoloj fare de la internacia lingvo kaj sia interna ideo.

Kaj laste ne balaste oni informis ke UEA programis por venontjaro la "Internacian Konferencon de ILEI", en BENINO, Afriko, kun la perspektivo ke en Afriko okazu iam ankaŭ Universala Kongreso.

Rezolucio de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto

“La 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006, kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj, konstatinte,

– ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

– ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva

diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

– ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

– ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon responde kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo”.

El argent-reto, interreto kaj E-revuoj

Nova Estraro de ILEI

La Komitato de **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** [ILEI], en sia kunsido okazinta je la 26-a de junio 2006, en Parmo, [Italio], kadre de la 39-a Konferenco de ILEI, elektis novan Estraron por la periodo 2006-2009:

- Radojica Petroviĉ, Serbio (prezidanto)

- Atilio Orellana Rojas,

Nederlando/Argentino (sekretario)

- Sjoerd Bosga, Svedio/Nederlando (kasisto)

- Aida Ĉizikaitė, Litovio (konferencoj, scienca agado)

- Zsófia Kóródy, Germanio/Hungario (E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj)
- Yas KAWAMURA, Japanio (azia agado)
- Miahai Trifoi, Rumanio (lerneja agado)

Forpaso

Esperanto perdis sian plej grandan verkiston

William Auld, la plej elstara Esperanto-verkisto, forpasis la 11-an de septembro 2006. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, eklernis Esperanton en 1937 kaj aktiviĝis en la Esperanto-movado en 1947, kiam li ankaŭ komencis serioze verki en Esperanto.

En la Jubilea Jaro 1987 William Auld estis elektita kiel Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Auld estis unu el la plej konataj kaj fekundaj kontribuantoj al la Esperanta kulturo, kiu aŭtoris, tradukis aŭ redaktis plurajn dekojn da libroj. Li estas unu el la plej ofte premiitaj partoprenintoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Auld redaktis du eldonojn de "Esperanta antologio" (1958 kaj 1984), la panoraman antologion de Esperanto-tekstoj "Nova Esperanta krestomatio" (1991) kaj kelkajn aliajn antologiojn. Li verkis amason da eseoj, artikoloj kaj prelegoj por multaj gazetoj kaj Esperanto-aranĝoj. Li verkis sennombrajn recenzojn kaj kelkajn lernolibrojn, i.a. "Paŝoj al plena posedo" (1968). Auld estis vicprezidanto de UEA (1977-1980), membro de la Akademio de Esperanto (1964-1983) kaj ĝia prezidanto (1979-1983). En 1995 Auld ricevis la Premion Deguchi, en 1998 li fariĝis la unua Esperantisto de la Jaro en la voĉdonado de "La Ondo de Esperanto", kaj en 2000 li gajnis la FAME-kulturpremion. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro. Ekde 1999 William Auld estis unuafoje kandidatigita por la literatura Nobel-premio.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 243

El la Leterkesto

El Bonaero

“Restu trankvila rilate al mi, ĉar tre bone mi ricevis per poŝto, la presitan junian numeron 26-a, 11-a jaro, 2006 [2], de la revuo de AEL: "Argentina E-Vento".

Kiel ĉiam, kaj precipe tiu ĉi numero, havas amason da precizaj kaj necesaj informoj pri la movado loka kaj monda. Elstarigas la nova rubriko "Distraĵoj" en paĝo 18-a, kie oni donas distreĉadon multe bezonata en tiu epoko de nervozemo kaj komunik-tensio.

Gratulegojn! Daŭrigu vian valoran laboron!” *Alfredo Juan Valle*

Korespond-deziras

“Saluton geesperantistoj, geamikoj!

Mi nomiĝas **Guillermo Bes Salazar** kaj loĝas en Kubo, mi estas kubano.

Mi estas 26-jara kaj estas agronoma inĝeniero. Mi eklernis Esperanton la 16-an de februaro, 2005, mi multe ŝatas ĝin, ĝi estas ŝlosilo por lingva demokratio, ĝi estas belega kaj interese lingvo, ĝi kunigas la homojn kaj la popolojn.

Mi lernas kaj studas Esperanton antaŭ unu jaro kaj mi jam povas paroli, legi kaj skribi Esperante. Mi havas multajn geamikojn enlande kaj eksterlande pere de Esperanto, mi korespondas kun ili per poŝtadreso kaj retadreso, mi havas geamikojn el Litovio, Brazilo, Belgio, Germanio, Bulgario, Ukrainio, Pollando, Usono, Francio, Nederlando kaj Hungario. Mi apartenas al Kuba Esperanto-Asocio (KEA). Post dek monatoj lernante kaj studante Esperanton mi ekinstruis ĝin en la sama lernejo kie mi lernis ĝin, mi multe ŝatas ĝin. Mi havas 5 gelernantojn, ili lernas en la unua nivelo de la kurso, poste ili komencos la duan nivelon ankaŭ kun mi kiel instruanto. Mi instruas per la lernolibroj “Scias vi Esperanton”, unua kaj dua nivelo kaj per “La Tuta Esperanto”. Mi bone klopodas por ke miaj gelernantoj bonege povu lerni kaj kompreni la lingvon, kaj por ke je la fino de la kurso ili povu

interparoli kaj interkomunikiĝi pere de la Internacia Lingvo-Esperanto. Mi laboras favore de Esperanto en mia lando por ke Esperanto estu konata de ĉiuj personoj kaj por ke nia Esperanto-movado kresku pli kaj pli enlande kaj eksterlande. Mi deziras korespondi kun vi ĉiuj, ni povas korespondi pere de poŝtadreso kaj retadreso, kiel vi deziru, jen mia poŝtadreso.

Ĉiuj mesaĝoj kaj leteroj estos bonvenaj:

Guillermo Bes Salazar

Calle 2 # 74 1/2 entre Gasómetro y 9,

Mariana de la Torre

CU-90200 Santiago de Cuba

Cuba

Telefono: 53 22 655721

<guillermo@cies.ciges.inf.cu>

Sincere kaj amike salutas vin,

Vilhelmo (ĝi estas mia nomo Esperante)”.

Propono el Hungario

Dear Sirs! Karaj Sinjoroj!

Estimataj gesamideanoj!

Mi gratulas vin pro la ampleksa gazeto! Vere tiel devas emon fari al Esperanto. Certe, ni devus sekvi vian ekzemplon en niaj lokaj tagaj gazetoj.

Mi pensas, ke vi ĉi paŝon sekvos poste dulingve (Esperanto-nacilingva) gazeto, kiel provo. Same, kia nia estas. Mi estas membro de UEA, de HEA kaj ano de la Nord-hungaria malgranda Esperanto-Amika Rondo "Király Lajos". Ni havas retpaĝon kaj sur ĝi elektran gazeton, kio aperas po monate. Ĝi certe kaj plie estas literatura, sed portas diversajn famojn, kaj ankaŭ interesaĵojn kaj el nia lando Hungario, el nia regiono Norda-hungario kaj el Esperantio.

Ĝia atingebleco estas:

<http://kiralylajos.extra.hu>

Se vi vizitos kaj plaĉos al vi, ni ĝojus, se vi vizitus ankaŭ alian, eĉ transdonus ĝian adreson ankaŭ al aliuloj. Sed, se vi kunlaborus kun ni kaj sendus al ni famojn pri iu ajn okazintaĵo aŭ literaturaĵon de geesperantistaro de Argentina, ni tre ĝojus.

Mi deziras al viaj ĉiuj Esperanto-klubanoj kaj ankaŭ al la redaktoroj de tiu taga gazeto multe da agademo, feliĉo, bonsano! Vivat Argentino!

Kun elkoraj salutoj:

Adrienne, samideano Pásztor

PS/: (Legu la familian nomon laŭ Esperanto-akcento. La nomsignifo estas: Pastoro)

Miskolc (Miŝkolc), Hungario

A n u n c i o s

AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión o colaborar con las tareas de AEL envíe su donación mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147-005789/3, a nombre de:

Alcides Pieter Wentinck

DNI 93.709.394

Calle Libertad 3226

B1602DJD Florida, Vicente López

Buenos Aires

y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a:

wanelec@sion.com

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista *Argentina E-Vento* también puede enviar su contribución mediante el "Banco Patagonia", depositando su aporte en "Caja de Ahorro" suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$4,84 como gasto bancario por depósito].

Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción:

rubendiaconu@yahoo.com.ar.

AEL agradece la colaboracion de:

E. de Garcia Brecque [Buenos Aires].

Adhesiones a UEA

Las adhesiones a UEA para el año 2007 deben ser enviadas lo antes posible, puesto que en diciembre se efectuará el envío correspondiente. Las cotizaciones son las mismas del año 2006 y pueden ser enviadas a Alcides P. Wentinck.

Distraĵoj

Literoj

Kiu kuzo ne estas ŝatata?
La a-kuzo.

Kiu ano ne estas homo?
La ban-ano

Kiu parolas ĉiujn lingvojn? La eĥo.

Kiu rano havas nur du piedojn?
La kampa-rano.

Kion fari por eviti konflikton kun la
bopatrino? Ne edziĝi.

La ĉielo havas ĝin, sed ne la tero.
La fraŭlino havas ĝin, sed ne la
sinjorino. La diablo havas ĝin sed ne
Dio:
“la litero L”

Interkompreno

Fremdulo diras al amiko:

- Ha! La bervalaninoj estas vere
inteligentaj.
- Jes, certe. Kiel vi rimarkis tion!
- Hieraŭ vespere mi renkontis be-
lan junulinon. Bedaŭrinde ŝi ne
parolis Esperanton. Mi desegnis
glason sur peco da papero, kaj ŝi tuj
komprenis, ke mi invitas ŝin al
drinkejo.
- Tio estas ja signo de ega inteli-
genteco
- Atendu. Post du minutoj ŝi prenis
pecon da papero kaj desegnis liton.
- Ho!
- Jes. Kiel ŝi povis tiom rapide
diveni ke mi estas litfabrikanto?

Antaŭen [ES]

Redakcio de Argentina E-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres.R. Sáenz Peña, Argentino

Sr/ra :

